# Bone alpa?as la kuba vakcino Soberana kontra? la Covid-19



**Klinikaj elprovoj de la vakcinoj  Soberana en  Instituto Finlay.**

Havano, dec 29 (RHK) En la kubaj sciencistoj de la instituto Finlay de Vakcinoj (IFV) sin esperimas la lando. Vi funkciis kiel familio, vi unui?is, bataladis, rezistadas meze de la malfavoro de la fini?anta jaro, kaj venkis.

Tiamaniere, la kuba prezidento Miguel Díaz-Canel taksis la laboron de la sciencista laborgrupo, plejparte virinoj, dum la tria vizito al tiu institucio, kie oni lin informis pri la progrsoj de la vakcino Soberana en ties du variantoj, 01 kaj 02.

La  prezidento asertis ke tiu ?i estas estas la plej malfacila en jardekoj por Kubo kaj la mondo,-kaj aldonis, ke la  scienca familio en Kubo agi kreiveme spite al la limigoj, travivis lerno-momentojn, transvivis etapojn kaj defiojn malfacilajn kaj alvenis al tiu ?i punkto.

Neniu lando de la Tria Mondo havas vakcinon en fazo de klinika elprovo kontra? la Covid-19, escepte de Kubo, kiu ne postrestas kompare al la mondo en tiuj ?i esploroj.

Tio ?i evidentigas la kapacitojn kreitajn de la lando, li emfazis, sed kapacitoj povas ekzisti en aliaj lokoj, ?i tie ekzistas aliaj aferoj kontribuantaj, nome, la sento kaj sin devigo pri la farata laboro.

La prezidento dankis al la familio de la instituto Finlay kune kun la aliaj institucioj, kiuj laboradis en la evoluigo de Soberana, kaj konfirmis respekton kaj fidon je la farotaj taskoj.

Siaflanke, Vicente Vérez Bencomo, ?enerala direktoro de la instituto kaj gvidanto de la projekto, informis ke amba? vakcinoj Soberanas avancis tre favore en la klinika elprovo; Soberana 01 balda? finos la Fazon 1 kaj Soberana 02 eniras la Fazon 2.

Amba? montirs fidon rilate sekurecon kaj respondon imunan. En la kazo de Soberana 02, pro ?iaj specifaj karakteroj, montris fruan imunan respondon (14 tagoj), kio ebligas transiron al Fazo 2 de la klinika elprovo pli rapide.

Soberana 01 anka? montirs sekurecon kaj respondon imunan tre boan, sed pli malrapidan, pro la tempo bezonata inter unu kaj alia dozo, kaj tial oni anta?vidas ke ?i eniru la Fazon 2 de la klinika elprovo en februaro.

La fakulo informis pri Soberana 02, ke januare oni vakcinos proksimume milon da dolonturoj en ties diversaj formuloj, kaj post aliaj pritaksoj kaj permesoj bezonataj, ?i eniron en la Fazon 3, kiun partoprenos proksimume 150 mil personoj en Havano.

Anka? evoluas intertraktoj por evoluigi la Fazon 3 de la klinika elprovo de Soberana 02 en aliaj landoj, pro la malalta enradiki?o de la Covid-19 en la kuba lo?antaro.

La ?enerala direktoro de la instituto Finlay ratifis la landan kapaciton por imunizi la kuban lo?antaron kontra? la viruso Sars-Cov-2 en la unua semestro de 2021.

Revuante la pa?ojn de la IFV kaj aliaj institucioj sciencaj pri la vakcino Soberana, kiu komencis evolui?i pasintmaje, la sciencisto esprimis: “Nekredeblas kiom ni sukcesis en sep monatoj”.

fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/243296-bone-alpasas-la-kuba-vakcino-soberana-kontrau-la-covid-19

Radio Habana Cuba